MAGYARORSZÁGI ESZPERANTÓ SZÖVETSÉG
HUNGARIA ESPERANTO-ASOCIO
1902

Samideano D-ro Carmel Mallia
99, La Vojo, Triq Is-Santwarju
Haż-Żabbar. ŻBR 1012
Malta

Estimata D-ro Carmel Mallia,

mi informiĝis kun ĝojo, ke vi tradukis la ikonece gravan verkon de la hungara literaturo La tragedio de l' homo, dramon de Imre Madách en la maltan lingvon. Por ni esperantistoj estis aparta ĝojo, ke vi faris tion el la elstara traduko Esperanta de Kolomano Kalocsay.

Ĉi tiu verko estas aparte grava por la hungara kulturo kaj pro ĝia universale valida enhavo ankaŭ por la eŭropa kulturo. Krome kaj krone, pro ĝia traduko el Esperanto ĝi fariĝis elokventa pruvo kaj ekzemplo pri la kulturperanta rolo de Esperanto, transdonante ĉi tiun filozofie kaj humane profundan verkon ankaŭ al la malta kulturo.

Estimata D-ro Mallia,
en la nomo de la Hungaria Esperanto Asocio permesu al mi esprimi nian elkoran gratulon por via neordinara kultura plenumo kaj transdoni kiel signon de nia alta estimo kaj aprezo de via laborado nian Honordiplomon.
Seán Ó Riain, prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio, organizo de la esperantistoj de Eŭropo petis min transdoni al vi siajn bondezirojn kaj altestimon en la nomo de la estraro de la Eŭropa Esperanto-Unio.

Ni deziras al vi fortikan sanon, bonan humoron por via plua agado literatura kaj laborado por nia komuna afero Esperanto!

István Szabolcs
estrarano de
Eŭropa Esperanto-Unio
komitatano A de HEA

Budapest, la kvaran de julio 2022.